

SERTA GRATVLATORIA
IN HONOREM
JUAN RÉGULO
esperantismo



volumen II

TO 1386293

UNIVERSIDAD DE LA LAGUNA

SERTA GRATVLATORIA

IN HONOREM
JUAN RÉGULO

II
ESPERANTISMO

INV. 48320



LA LAGUNA

1987

La Junta de Gobierno,
presidida por el Magfco. y Excmo. Sr. Rector,
decidió la publicación de esta *Serta gratulatoria*
como Homenaje al Profesor
DON JUAN RÉGULO PÉREZ
con motivo de su jubilación, a los 70 años, en la
Universidad de La Laguna

COMISIÓN ORGANIZADORA

Presidentes:

JOSÉ-LUIS MELENA JIMÉNEZ, Filólogo Clásico
RAMÓN SERRERA CONTRERAS, Americanista
JORGE FUENTES DUCHEMIN, Químico

Vocales:

MARÍA-FELIPA NÚÑEZ MUÑOZ, Historiadora
JULIO HERNÁNDEZ GARCÍA, Historiador
MANUEL-ANTONIO DE PAZ SÁNCHEZ, Historiador

Secretario:

JUAN-FRANCISCO MARTÍN RUIZ, Geógrafo

KAŜAJ KAJ MALKAŜAJ REFLEKSIVAJ PREFIKSOIDOJ EN ESPERANTO

Kiel la vortaro de la etnaj lingvoj, ankaŭ la vortotrezoro de Esperanto prezentigas al atenta observanto kiel plurtavola strukturo, en kiu nur la surfaco partoprenas produktive en la komunikada funkcio, dume, pli profunde, nome en la faldoj de pluraj radikoj sedimentiĝis elementoj iam aktivaj kaj funkcioplenaj, kompreneble ne en la relative mallonga historio de Esperanto, sed en tiu de la diversaj kulturaj lingvoj de Eŭropo, ĉefe la latina kaj la greka, sur kies grundo firme enradikiĝis la nova planto.

Ni ekzamenos en tiu ĉi artikolo la manieron en kiu vivas produktive aŭ kaŝiĝas fosilie kelkaj prefiksoidoj, kiuj, tra la latinaj kaj grekaj vortoj hereditaj de Esperanto, retroiras al la prahindeŭropaj refleksivaj elementoj **swe-*, **swe-di-*, **swe-tar-*, **swi-di-* kaj **bhi-l-*.

1. LA SIN-KUNMETOJ

El lingvokompara vidpunkto, unu el la apartaĵoj de Esperanto estas ĝia kapablo produkti substantivojn, adjektivojn kaj adverbojn pere de la kunmeto de la refleksiva pronomo *si* en akuzativo kun radiko de transitiva verbo, ekz.: *sin/altrudado*, *sin/deteno*, *sin/dona*, *sin/gardemo*, ktp, vd. *PAG*, § 160, p. 220; § 310, p. 419.

Tiu ĉi tipo de vortkunmeto estas probable unika, ĉar ĝenerale, almenaŭ en la hindeŭropaj lingvoj, anstataŭ la refleksiva pronomo oni preferas uzi elementon analogan al Esp. *mem* aŭ al Esp. *aŭto-*, aŭ oni subkomprenas la reflexivecon. La avantaĝo de la morfemoj respondantaj al *mem* estas, ke ili povas kunmetiĝi kaj kun transitiva verboradiko, ekz.: germane *Selbst/beherrschung*, ruse *samo/kontròl'*, itale *auto/controllo* 'mem/regado, sin/regado', kaj kun verboradiko netransitiva, ekz.: germane *Selb/ständigkeit*, ruse *samo/stojàtel'nost'* 'mem/stareco'. Siavice la Esp. prefiksoido *sin-* havas la avantaĝon aludi ankaŭ la reciprokecon, ekzemple en *frata sin/helpado*, *amika sin/komprenado* ktp.

Sed tio, kio mirigas en la Esp.-kunmetaĵoj kun *sin-* estas ke ili ekzistas kaj ĝuas certan produktivecon malgraŭ la fakto, ke la refleksiva pronomo *si* (el la prahindeŭropa elemento **swe-*) estas kutime ligata al la tria persono. Similaj vortoformoj troviĝas fakte nur en kelkaj hindeŭropaj lingvoj, kie la menciita pronomo estas absolute indiferenta al la gramatika persono. En sanskrito, ekzemple, ekzistas longa serio da vortoj formataj de la refleksiva pronomo *sva-*. En tiu lingvo, tamen, tiu pronomo kunmetiĝas nur kun netransitivaj verboradikoj aŭ pasivaj vortoformoj, ekz.: *sva/bhū* 'ekzistanta per si mem', *sva/kṛitá* 'farita de si mem', *sva/jāta* 'naskita de si mem' (vd. Monier-Williams, 1899: 1275-1278).

Malgraŭ tiu ĉi diferenco, la analogio inter Esperanto kaj sanskrito estas frapa. Krome, en ambaŭ lingvoj la refleksiva pronomo ne rajtas prefiksiĝi al verba formo: kvankam oni diras *mia sin/deteno*, oni ne povas diri *mi sin/detenas*, sed *mi detenas min* (en la voĉdonado). Tio pruvas, ke la kunligiteco inter la refleksiva pronomprefikso kaj la verba radiko ne estas fiksa kaj stabila: ĝi validas nur por la derivitaj substantivoj, adjektivoj kaj adverboj, sed ne koncernas la verbajn formojn. Cetere, la samo okazas por *mem-* kaj la samsignifaj prefiksoidoj.

Tute alia estas la kazo de tiu escepta vorto, kiu estas en la latinidaj lingvoj la respondanto de Esp. *suicidio*, artefarita kunmetaĵo per la latina pronomo genitivo *sui* 'de si' kaj la latina elemento *-cidium* '-mortigo' (kp. france *régi/cide*, *géno/cide*, *insecti/cide*). Tie la pronomo elemento estas tiom ligita kun la verba radiko, ke ĝi aperas ankaŭ en la verbaj formoj, eĉ akompanate de plia refleksiva pronomo, ekz.: france *il se suicida* 'li mortigis sin mem'.

2. LA SE-KUNMETOJ

Inter la multaj leksikaj deriviloj, ne plu produktivaj kaj ne plu disigeblaj, kiujn Esperanto heredis de latino pere de la modernaj lingvoj de Eŭropo, unu estas etimologie ligita kun *sin-* kaj certgrade ankoraŭ konservas la originan refleksivan signifon: temas pri la pseŭdoprefikso *se-*. Sentita jam en latino kiel antaŭverba morfemo kaj ne plu produktiva, latina *sē-* aŭ *sēd-* devenas de la ablativo de la refleksiva pronomo (prahindeŭrope *s(w)e-d(i)*, vd. Zimmermann, 1915: 241; Walde, 1954: 507) el la tempo, kiam en pralatio ĝi ankoraŭ estis indiferenta al la persono. La specifa signifo de *se-* estis tre verŝajne 'por si mem; aparte', ekz.: latine *sed/itio* 'irado por si mem; ribelo, tumulto, malpaco', *se/ducere* 'tiri, treni por si mem; delogi, trompi', *se/ponere* 'meti por si mem; deponi' ktp.

Prefiksita al verba radiko, la pronomo elemento *se-* sufiĉe bone konservis sian originan signifon, kvankam ĝi evoluis en la senco de apartigo favore de la aganto, nome 'en aparta(n) loko(n), aparte'.

Malofto prefiksita al substantiva radiko, la latina *se-* akiris la sencon de 'en alian lokon ol, ekstere de, ekster' kaj fine de 'sen', ekz.: *se/dulus* 'sentrompa; fervora' (kp. angle *without* 'ekster; sen').

Laste, tiu pronomo elemento kapablis memstariĝi kiel kontraŭeca aŭ restriкта konjunkcio, pasante de la signifo 'en aparta loko' al tiu de 'sed' sub la formo *sed*, kiu pluvivas en Esperanto (vd. Ernout-Meiller, 1967: 609; kp. nederlande *zonder* 'sen'; germane *sondern* (1) 'sed', (2) 'aparigi').

Ne multaj estas la *se-*vortoj, kiujn Esperanto heredis de latino. Krom la ĵus menciita konjunkcio *sed*, ekzistas serio da vortoj, kie *se-* aperas antaŭ radikoj aŭ temoj de verba karaktero.

CES-

De la temo *ces-* de la latina verbo *cedo*, *cessi*, *cessum*, *cedere* 'iri, pasi' venas *se/cesio* 'iro por si mem, iro en apartan lokon, apartiĝo', vorto kiu apartenas al

la sama etimologia familio de *cedi*, *ak/cesora* (de **ad/cedo*), *eks/ceso*, *kon/cesio*, *pro/cedi*, *pro/ceduro*, *pro/ceso*, *pro/cesio*, *re/ceso*, *re/cesiva*.

GREG-

De la radiko *greg-* (kp. lat. *grex*, *gregis* 'grego') venas *se/gregacio* 'arigo en apartan lokon, apartigo, apartiĝo', vorto ligita kun *a/gregi*, *a/gregacio*, *a/gregato* kaj *kon/gregacio*.

KRET-

De la temo *cret-* de la verbo *cerno*, *crevi*, *cretum*, *cernere* 'distingi; fiksi' venas la vortoj *se/kreto*, *se/kretario*, *se/kretariato*, *se/krecio*, *se/kretino*, ligitaj al la baza koncepto 'distingi por si mem, apartigi'. Ili parenkas kun la vortoj *de/kreto*, *dis/krecio*, *dis/kreta*, *eks/krecio*, *kon/cerni*, *kon/kreta*.

LEKT-

De la temo *lect-* de la verbo *lego*, *legi*, *lectum*, *legere* 'observi, legi; rikolti' venas la verbo *se/lekti*, proprasence 'rikolti por si mem, rikolti aparte', etimologie parenca kun *leciono*, *legi*, *legendo*, *lekcio*, *lektoro*, *di/ligenta*, *di/liĝenco*, *e/lekti*, *inte/lekto*, *inte/ligencio*, *inte/ligenta*, *ko/lego*, *ko/legio*, *ko/lekti*, *ko/lektiva*, *pre/lego*.

PARA-

De la radiko *para-* de la verbo *paro*, *paravi*, *paratum*, *parare* 'aranĝi' venas fine la vortoj *se/pari*, *se/paratismo* kaj *se/pareo*, proprasence ligitaj al la ideo 'aranĝi por si mem, aranĝi aparte'. Tiuj vortoj apartenas al la sama familio de *paradi*, *paradoso*, *parapeto*, *paraŝuto*, *kom/pari*, *kom/paracio*, *kom/paratismo*, *pre/pari*, *re/paracio* kaj *ri/pari*.

De la latina lingvo Esperanto heredis plie tri *se*-kunmetojn, nome *se/kura*, *a/se/kuri* kaj *s/obra*, en kiuj la pronoma elemento havas la signifon 'sen' pro la substantiva karaktero de la radiko.

Se/kura venas de *se/curus* 'sen-zorga', siavice de *cura* 'zorgo' (vd. Ernout-Meillet, 1967: 630). El la parolataj variantoj de *securus* la latinidaj lingvoj kreis poste la verbon reprezentatan en Esperanto de *asekuri* (kp. portugale *assegurar*, hispane *asegurar*, itale *assicurare*). Etimologie parencaj kun tiuj du vortoj estas *kuraci*, *kuratelo*, *kuratoro*, *pro/kuri*, *pro/kuratoro*, *pro/kuroro* kaj *sine/kuro*.

Fine, *s/obra* venas de *sobrius* 'sen-ebria', siavice de *se-*obri-*, varianto de la radiko *ebri-*, de kie venas tra la latina *ebrius* la Esp. adjektivo *ebria* (vd. Ernout-Meillet, 1967: 630).

Al la listo de la Esp. radikoj, kiuj entenas la fosiliĝintan refleksivan pronomelementon *se-* (ĝis nun mi menciis 15 radikojn registritajn en *PIV*, nome *sed*, *secesi-*, *segregaci-*, *sekret-*, *sekretari-*, *sekretariat-*, *sekreci-*, *sekretin-*, *selekt-*,

separ-, *separatism-*, *separe-*, *sekur-*, *asekur-* kaj *sobr-*), oni devus aldoni *solv-*, *solvat-*, *solvent-*, *absolut-*, *absolv-*, *resoluci-*, *rezoluci-*, *rezolut-*, kiuj venas de la latina verbo *soluo*, *solui*, *solutum*, *soluĉre* 'malligi'. Tie ĉi la komenca silabo *so-* reflektas varianton de la refleksiva pronomelemento *se-*, kunmetitan kun la pralatina verbo **luĉre* 'malligi; flui' (vd. Tagliavini, 1962: 60; Ernout-Meillet, 1967: 609; kp. latine *al/-*, *di/-*, *e/-*, *per/-*, *pro/luĉre*, Esp. *a/luvi-*, *di/lu-*, *di/luv-*, *e/lu-*, greke *lúein*, Esp. *lio/tropa*, france *lyo/philisation*). El tio deduktiĝas, ke la origina signifo de *solvi* estis 'malligi por si mem'.

3. CETERAJ IAM REFLEKSIVAJ KUNMETOJ

Antaŭ ol konkludi, mi volas mencii alian grupon de Esp.-vortoj, ĉi foje grekdevenaj, en kies radiko kaŝiĝas refleksiva pronomelemento. Temas pri la vorto *hetajro* kaj la vortoj formitaj per la elementoj *idio-* kaj *fil(o)-*.

Hetajro venas de la ingenra formo de *betaĩros* 'kunulo, amiko', nome *betaĩra* 'amikino, kunulino, instruita prostituitino'. Laŭ Bader (1982: 121) temas pri derivaĵo de la refleksiva pronomo **swe* : **s(w)e-tar-*, proksimume 'sia-ulo' (kp. greke *etēs* 'parenco', ruse *svójstvo* 'karakterizaĵo', *svojstvó* 'parenceco', *svoják* 'bofrato, familiamiko', *svojáčenica* 'bofratino', *svójskij* 'sociema' el la personindiferenta refleksiva pronomo *svoj*).

Analoge, la elemento *idio-* de Esp. *idioblasto*, *idiomo*, *idiopatio*, *idiosinkrazio*, *idioto* kaj *idiotismo* venas de **s(w)i-di-* 'sia, de si mem, apartenanta propre al' (vd. Bader, 1982: 123, 142).

Pli problemeca estas la pronoma etimologio de la grekdevenaj Esp. radikoj *filadelf-*, *filantrop-*, *filatel-*, *filharmon-*, *filipik-*, *filolog-*, *filosemit-*, *filozof-*, *filtr-*, *filtrum-*. En la greka fakte la vorto *philos*, de kie Esp. *fil(o)-* venas, havas du signifojn: (1) 'amiko' (de kie *phileĩn* 'ami', *philótēs* 'amikeco', *philēma* 'kiso'), (2) 'mia/via/lia/sia/ĝia/nia/ilia; propra'. La problemo estas determini, ĉu temas pri konverĝo de du homofonaj diverssignifaj radikoj, kaj, se ne, el kiu el la du signifoj fontis kiu. Lastatempaj esploroj sukcesis demonstri, ke la signifo (2) estas la origina kaj ke *phil-* devenas de la genitivo de la montra pronomo el la radiko **bhi-* : **bhi-l-* 'ties', kp. hitita *a-pí-(e-)el*, genitivo de *a-pa-as* 'tiu', lidia *bilis* 'sia'. El **bhi-l-* > *phil-* evoluis do unue la signifo (2), kaj poste tiu de 'plenrajta membro de grupo; proprulo', kontraste kun *xénos* 'fremdulo' (vd. Bader, 1982: 129; Hamp, 1982: 254).

FABRIZIO A. PENNACCHIETTI

Akademio de Esperanto
Universitato de Torino, Italio

BIBLIOGRAFIO

- Bader, F.: «Autour du réfléchi anatolien: étymologies pronominales», ĉe *Bulletin de la Société de Linguistique de Paris*, 77, 1 (1982), pp. 177-207.
- Ernout, A.-Meillet, A.: *Dictionnaire étymologique de la langue latine. Histoire des mots*, Paris, Klincksieck, 1967⁴.
- Hamp, E. P.: «Philos», ĉe *Bulletin de la Société de Linguistique de Paris*, 77, 1 (1987), pp. 251-262.
- Monier-Williams, M.: *A Sanskrit-English dictionary etymologically and philologically arranged with special reference to cognate Indo-European languages*, London, Clarendon Press, 1899.
- Tagliavini, C.: *Fonetica e morfologia storica del latino*, Bologna, Patron, 1962.
- Zimmermann, A.: *Etymologisches Wörterbuch der lateinischen Sprache*, Hannover, 1915.
- PAG=Kalocsay, K.-Waringhien, G.: *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*, 4-a eld., Rotterdam, UEA, 1980.
- PIV=*Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*, Paris, SAT, 1970.